

NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)

Redaktas:
J.Miguel García Iturrioz
(jmgiaa@gmail.com)



Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

✉ esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: <https://sites.google.com/site/esperantobi/home>
En Fejsbuko, serĉu “esperanto grupo bilbao”

Jar-kotizoj: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna: 20 €.
KUTXABANK(BBK)-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550

JULIO/SEPTEMBRO 2018

Nro. 116 (3/18)

ESPERANTO KURSO

NIVEL MEDIO OCTUBRE-DICIEMBRE 2018



Comienzo: VIERNES 5 DE OCTUBRE a las 19,30h.

Todos los viernes de 19,30h a 20,45h (curso trimestral)

Precio total del curso: 30 euros. Incluye dos libros para usar en clase:

-“faktoj kaj fantasioj” de Marjorie Boulton.

-“Mil unuaj vortoj en Esperanto”

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO. Barrenkale Barrena 7 – 1º Dcha.

esperantobi@gmail.com Tfno: 656 77 60 65

LOKE ...

VIZITIS NIN ...

Meze de septembro vizitis nin Fatma, el Turkujo. Niaj amikoj David kaj Paco montris al ŝi nian E-Grupejon kaj la ĉirkaŭaĵojn de Bilbao.



Ankaŭ vizitis nin Valentina, ĝitala estraranino de TEJO kun ŝia amiko Luigi. Sur la malsupra foto, ilin akompanas kelkaj membroj de la Grupo.



QR-kodo de la Grupo.



Jen bildo, kiu reprezentas la retadreson de nia E-Grupo (<https://sites.google.com/site/esperantobi/>) en maniero QR. Ni metis (-os) ĝin ene de "Nia Ponto", sur la frontopaĝo, por ebligi la iron al nia TTT-ejo sen la bezono tajpi la tutan adreson.

(F. López. 04/05/2018)

LA KRISTNASKA LOTERIO, JAM AĈETEBLA.



Jam estas pretaj la kutimaj loterikvitancoj de la Grupo.

La ĉi-jara numero estas tiu, kiu videblas sur la apuda bildo, t.e., la numero **96.201**. Ĉiu bileto kostas 5 €, el kiuj oni ludas 4 € kaj restas 1 € kiel donaco al la Grupo.

Kiel ĉiam, ni kalkulas je via helpo por la disvendado de la biletoj.

Ankau eblas aĉeti loterion per interreto:

1. Enkontigu la monon en la konto de la Grupo Esperantista de Bilbao.
IBAN-kodo: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**.
2. Sendu retmesaĝon al esperantobi@gmail.com informante pri la monenkonto.
3. Ni sendos la biletojn per retpoŝto.
4. Se la biletoj estas premitaj, ni rekte sendus la monon al la bankkonto indikita de la aĉetinto.

FINIĜIS NOVA KURSO.

En junio finiĝis la kurso gvidata de nia samideano David Redondo. Sur la foto, la instruisto estas ĉirkaŭata de kelkaj el la gelnantoj ĉe la enirejo de la E-Grupo.



Kial ne aliĝi al HEF?

Se vi dezirus aliĝi al Hispana E-Federacio (HEF) kaj ĝui ĝiajn servojn, memoru ke oni kreis retan formularon

https://docs.google.com/forms/d/1QvzHomKs9Y5vf_z2XnH88Da9gQP_rxvPXAddQPs_prMQ/

Ankaŭ eblas pleniĝi la paperan formularon por la jaro 2019, kiun vi trovos en nia retejo en formato pdf.

<http://www.esperanto.es/hef/images/PDF/HEF-ALIGHILO.pdf>

Ne dubu! Ni estas neprofitcela asocio, kiu ne ricevas eksterajn helpojn, kaj nur dependas de niaj anoj por antaŭenigi Esperanton en nia lando.

Jara kotizo estas nur 32 eŭra kaj rajtigas vin ĝui **fiskan avantaĝon**: en nia provinco, Bizkajo, oni rajtas demeti 20% de la kotizo en la jara imposta deklaro (IRPF).

Se vi havas dubojn, vi povas skribi al la administra adreso de la Federacio: admin@esperanto.es. Por aferoj rilataj al kotizoj, same se vi estas nova aŭ jam veterana membro, memoru ke estas specifa adreso por la kasisto: financoj@esperanto.es.

Esperanto inter la kursoj elekteblaj en CUID (UNED)

Mi povas anonci ke la Rega Konsilio de la Universitato UNED aprobis la interkonsenton UNED-HEF, per kiu esperanto estos unu el la lingvoj elekteblaj en la proponataj lingvo-kursoj de CUID (Centro Universitario de Idiomas Digital y a Distancia, do universitata centro pri neĉeesta kaj bita lingvo-instruado), sub la gvidado de HEF, por la kurso 2018/2019.

La kurso havos tute neĉeestan karakteron kaj ĝi celos atingigi al la kursanoj la nivel-kompetentecon A2 en la kvar lertoj (lega, skriba, aŭda, parola), surbaze de nenia antaŭa scipovo de esperanto. Ĝia cel-publiko estas hispanlingvanoj (denaskaj aŭ ne) ĉar la kurso disvolviĝos en la hispana lingvo.

HEF celas arigi skipon da kunlaborantoj por la kreado de kurso-materialoj kaj helpo al gvid-instruisto, kiu estos elektita per malferma konkurso baldaŭ kunvokota de UNED.

http://portal.uned.es/portal/page?_pageid=93,154330&_dad=portal&_schema=PORTAL

(Manuel Pancorbo. 08/05/2018)

Jam aprobata la nomumo de instruisto en UNED.

Resolución de Plazas de Profesorado Colaborador del CUID (03/09/2018)

En conformidad con la Normativa General de Funcionamiento del CUID, la Comisión de Selección de Profesorado Colaborador del CUID, reunida el 21 de septiembre de 2018, una vez valorados los currículos de los solicitantes según el baremo previamente publicado, acuerda la siguiente lista de seleccionados para cubrir la plaza de profesorado del CUID actualmente vacante:

*Tutor en Línea (TeL) para los cursos de esperanto nivel A2: **D. Félix Manuel Jiménez Lobo.***

(HEF. 21/09/2018)

EBLAS JAM ENSKRIBIĜI EN LA KURSO DE E-O EN UNIVERSITATO UNED.

Komence de septembro malfermiĝis la periodo por enskribiĝo ("matrícula") en la kursoj de lingvoj de la Nacia Universitato pri Neĉeesta Edukado (UNED - Universidad Nacional de Educación a Distancia), kaj, inter ili, kiel granda novaĵo, la **kurso de Esperanto**.

En tiu ĉi akademia jaro eblos akiri la nivelon A2, instruotan pere de tutorigita neĉeesta kurso, kaj per kiu oni ricevas oficialan titolon de la Universitata Centro de Bitaj kaj Neĉeesta Lingvoinstruado (CUID) de la UNED. La kurso estos instruita en la hispana, kaj ĉiuj datumoj por enskribiĝo, kaj ankaŭ la Gvidilo de la kurso kaj la informoj pri kontakto, troviĝas en la retaj paĝoj de UNED.

Hispana Esperanto-Federacio kunlaboras kun UNED pri diversaj taskoj, inklude la fiksadon de kriterioj, la pretigadon de la instrumaterialo, la vendon de libroj, ktp. La kunordiganto de la kurso estas Manuel Pancorbo, profesoro pri Fiziko de la UNED kaj ano de la Federacio.

La UNED multe engaĝiĝis dum tiuj ĉi monatoj, inter alie per la gastigado de la plejparto de la kongreso de ILEI en Madrido en julio. La vicrektorino pri esplorado kaj internaciigo, Esther Souto, prezidis la oficialan inaŭguron de la Kongreso, kun tre varmaj vortoj, inter kiuj kelkaj en Esperanto. Alia profesoro de la Fakultato de Filologio, Nuria Polo, kunprezidis la Simpozion pri "La kultura heredaĵo de Esperanto" organizita ene de la Kongreso, en kiu prelegis interalie ankaŭ la direktorino de la centro CUID Silvia Barreiro. Krome, en la retejo de la UNED vi povas trovi diversajn materialojn pri la Universitato, la kurso, la kongreso kaj Esperanto ĝenerale.

(La Bitbulteno" de HEF. Nro. 49. Septembro 2018)

GRANDA SUKCESO DE LA IBERIAJ E-KONGRESOJ.

La unua estis la 77a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis en Madrido, inter la 20a kaj 22a de julio, kaj parte koincidis kun la okazigo de la 51a kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) dum la sekva semajno. Aliĝis pli ol 260 homoj, el kiuj fine venis 231, ĉu al unu ĉu al ambaŭ renkontoj, el plej diversaj partoj de la mondo, inklude multaj el Azio, Ameriko kaj eĉ el du afrikaj landoj (aliaj bedaŭrinde ne ricevis la necesajn vizojn).

La programo estis tre varia, kombinante la instruajn, kulturajn kaj la organizajn eventojn, kun tiuj distraj kaj turismaj. Mallongan resumon pri ambaŭ oni povas trovi en la Vikipediapaj paĝoj pri ambaŭ renkontoj: Hispana Kongreso kaj ILEI-Kongreso.

Krome, se vi ne povis ĉeesti, oni povas spekti multajn erojn de la kongresoj en la videa kanalo de HEF <https://www.youtube.com/user/esesperanto>. Pluraj aliaj estos publikigitaj dum venontaj semajnoj.

Oni trovas ankaŭ tre interesan raporton (en la hispana) pri la inaŭguro en la retejo de UNED, kun kompleta video en du partoj. En la unua, pli solena, dulingva, partoprenis la vicrektorino de la Universitato UNED, Esther Souto, kaj la skabenino, prezidanto de la urba distrikto Moncloa, Montserrat Galcerán. La dua parto okazis nur en Esperanto, kun salutoj de kongresanoj reprezentantaj diversajn landojn. Aldone, en tiu sama adreso eblas spekti la du erojn de la Nacia Vespero de tiu kongreso.

(La Bitbulteno" de HEF. Nro. 49. Septembro 2018)

HISpanoj OMAĜITAJ DE UEA



La plej granda renkonto de la sezono estis la Universala Kongreso, kiu ĉijare okazis en Lisbono (Portugallio), tuj post la fino de la madridaj kongresoj. Ĉeestis entute 1567 homoj, el 75 landoj, inter ili ĉirkaŭ 80 venintaj el Hispanio.

Dum la Universala Kongreso de Lisbono, oni anoncis la nomumon de tri novaj Honoraj Membroj de Universala Esperanto-Kongreso (UEA), el kiuj du venas el Hispanio: la iama prezidantino de Hispana Esperanto-Federacio, **María Rafaela Uruña Álvarez**, kaj la kataluna aktivulo **Josep Franquesa i Solé**, prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio. Iliajn biografiojn oni povas legi en la oficiala komuniko de UEA.

Krome, en la ferma ceremonio de la kongreso oni disdonis 8 diplomojn pri Elstara Agado, el kiuj unu estis aljuĝita al la nuna prezidanto de HEF, **José Antonio del Barrio**.

(La Bitbulteno” de HEF. Nro. 49. Septembro 2018)

GRANDA PARTOPRENO DE JUNULOJ EN BADAJOZ

Komence de aŭgusto, tuj post la Universala Kongreso, okazis en Badaĥozo (Badajoz, Ekstremaduro) la Internacia Junulara Kongreso. Ĉeestis pli ol 280 esperantistoj, plejparte junaj, el ĉiuj kontinentoj.

Laŭ ĝenerala konsento, la IJK estis tre sukcesa, bone organizita kaj kun tre altira programo kaj etoso. En la reto oni povas spekti diversajn videojn, kaj legi blogaĵojn kun la spertoj de partoprenintoj. Ni rekomendas kiel ekzemplon tiun de juna malagano, Jozefo, kiu unuafoje ĉeestis esperantan programeron, kaj rakontas siajn impresojn en sia jutuba kanalo.

Ni devas ankaŭ mencii la gravan komunikan efikon de la renkonto. La loka kaj regiona gazetaro publikigis plurajn raportojn dum la antaŭaj tagoj kaj dum la renkonto mem. Je landa nivelo ni povas elstarigi la ampleksan artikolon de la plej disvastigita ĵurnalo El País, kun la titolo "La utopía del esperanto, ese idioma mojosa" (tiel, kun "mojosa" en la titolo). Kelkajn tagojn poste la kataluna ĵurnalo "El Periódico de Catalunya" publikigis intervjuon kun Jordi, juna kataluna esperantisto.

Dum la kongreso okazis renkontoj de junaj hispanaj esperantistoj, kiuj tiamaniere interkonatiĝis kaj povis plani novajn komunajn agadojn en nia lando. Inter la rezultoj, oni elektis novan prezidanton de HEJS (la junulara sekcio de la Federacio): William Guerrero. Oni ankaŭ organizis la laboron, ekz. la vivigon de la sociaj retoj kaj aliaj informiloj.

Ni faras alvokon al la junaj esperantoparolantoj, inklude de ne membroj de asocioj, kiuj deziras kunlabori aŭ simple preni kontakton kun aliaj junuloj, skribu al hejs@esperanto.es, aŭ kontaktu la asocion per la retejo www.esperanto.es/joven kaj la sociaj retoj (Facebook, Twitter aŭ Instagram).

(La Bitbulteno” de HEF. Nro. 49. Septembro 2018)

LA VENONTA HISPANA KONGRESO ...

Okazos en la urbo **Malago** de la **1-a ĝis la 5-a de majo 2019**, parte kune kun la kongreso de IFEF (Internacia Fervojojista Esperanto-Federacio), kiu disvolviĝos de la 3-a ĝis la 9-a.

Jam eblas aliĝi. La kongresa retpaĝo estas:

<https://esperanto-andalucia.info>

TRA LA MONDO ...

Gazeto de enigmoj en Esperanto! - senpage

SEMAJNO DE ENIGMOJ - La unua gazeto de enigmoj en Esperanto!

Ĝi enhavas klasikajn krucvortenigmojn, kriptan kaj silaban krucvortenigmojn, vortoserĉon, rebuson, aliajn vortopuzlojn, novaĵojn, kaj ceteraĵojn.

Ĉefredaktoro de Semajno de Enigmoj estas Giorgio Denti, ankaŭ prezidanto de Roma Esperanto-Grupo. Abono estas SENPAGA. La aktualaj numeroj estas dissendataj retroŝte al la abonantoj.

Detaloj ĉe la retejo:

[http://www.semajnodeenigmoj.com/informo_2.html]

(<http://www.eszperanto.hu/leteroj/page.php?link=45f97kk7&id=498&b=1&x=60125&y546&z=58&dt=1525437492>)

(Ret-Info / Lingvo-Studio, LS. 05/05/20198)

FUTBALMAĈO POR LA POKALO ZAMENHOF.

SvisRaporto prezentas la futbalmaĉon por la Pokalo Zamenhof dum la 103-a Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono:

<https://www.youtube.com/watch?v=2TkpvVCSFEk>

La esperantistoj perdis la ludon, sed ili gajnis la korojn de la lokanoj en Lisbono! Ĝuu la maĉon, se vi ne ĉeestis mem en Lisbono kaj reĝuu ĝin, se vi ĉeestis – kaj jam vi scias, kiun programeron vi nepre ne maltrafu en Lahtio!

(Dietrich Michael Weidmann. 18/08/2018)

VIKIPEDIO EN ESPERANTO ATINGAS SIAN 250-MILAN ARTIKOLON



La 18-an de Septembro 2018 Vikipedio en Esperanto atingis sian 250-milan artikolon. La koncerna artikolo estas "Livaie", pri komunumo en Francio, kaj verkis ĝin kontribuanto Dominik. Legu ĝin ĉe <https://eo.wikipedia.org/wiki/Livaie>.

La Esperanto-lingvan version de Vikipedio fondis Chuck Smith la 6-an de novembro 2001. Kun la helpo de Jerry Muelver kaj Stefano Kalb, li publikigis la unuan version la 2-an de januaro 2002, kun pli ol 300 paĝoj.

La artikoloj estas libere redakteblaj kaj lastatempe pli ol 300 uzantoj redaktas Vikipedion en Esperanto ĉiumonate. La volontuloj de Vikipedio daŭre aldonas novajn artikolojn kaj samtempe pligrandigas kaj plikvalitigas jam ekzistantajn. En la enciklopedio estas krom teksto ankaŭ fotoj, videoj, sonaĵoj kaj eĉ 3D-objektoj. La tuta projekto estas ebla nur danke al tuja kunlabora reviziado per interreto -- kaj multaj volontuloj.

La Esperanta Vikipedio tenas la 32-an pozicion inter Vikipedioj laŭ nombro de artikoloj. Proksimaj estas la eŭska (45 mil pli), la bulgara (5 mil malpli) kaj rapide proksimiĝas la armena. Sed kvanto de artikoloj ne estas ĉio -- gravas ankaŭ kvalito de ili. Konsiderante kvaliton de la 1.000 plej gravaj artikoloj, la Esperanta Vikipedio estas en tre bela 16-a loko. En la tutmonda Vikimedia movado ĝi estas pozitive taksata, ĉar ĝi fondiĝis tre frue, kunigas signifan komunumon kaj eĉ estas oficiale reprezentata de la organizo Esperanto kaj Libera Scio (ELiSo).

Vikipedio ebligas aliron al artikoloj pri plej diversaj temoj kutimaj en enciklopedio, el ĉiuj fakoj, sed por la Esperanto-komunumo ĝi havas kroman valoron, nome registri artikolojn pri Esperanto-aktivaĵoj kaj iniciatoj, kun fotoj kaj ilustraĵoj pri multaj faktoj kaj homoj, kiuj konsistigis la evoluon de nia lingvo laŭlonge de pli ol 130 jaroj. La artikoloj de Enciklopedio de Esperanto (1934) estis enretigitaj kaj (ankaŭ) vi povas daŭre grandigi kaj plibonigi ilin. Specife utila ĝi estas por fakaj asocioj, kiuj per ĝi povas facile disvastigi informojn de sia fako.

Dum multaj jaroj de sia ekzisto Vikipedia medio multe ŝanĝiĝis. Komence redaktado okazis per speciala kodo, ne tre malfacila, sed neintuicia por neteĥnikemuloj. Nuntempe vi povas redakti kaj formatigi tekston simile kiel en retroŝto. Aldone, progresaj teĥnikaj iloj nun faras plurajn monotonajn laborojn, do vi povas fokusiĝi pri la vera kerno -- bonkvalita teksto. Eĉ, ĉiam pli da homoj faras simplajn redaktojn (ekz. korektado de mistajpoj) per poŝtelefona aplikaĵo. Por helpi al Vikipedio, komencu per https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Bonvenon_al_Vikipedio.

Ĉar Vikipedio estas utila al la Esperanta komunumo, pluraj organizoj jam helpis kaj plu helpas ĝin. Inter ili estas UEA, TEJO, E@I kaj novfondita Esperanto kaj Libera Scio, specife fokusiĝanta pri Vikimedia agado. Sen tiuj organizoj Vikipedio ne estus tiom bunta, kiom ĝi estas nun.

Statistikaĵojn pri ĉiuj pli ol 200 versioj de Vikipedio oni trovas ĉe https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_Wikipedias#Detailed_list, dum specifaj pri la Esperanto-versio troviĝas ĉe <https://eo.wikipedia.org/wiki/Specialaĵo:Statistikoj>.

UEA kaj ELiSo varme gratulas -- kaj kore dankas -- tiom da aktivuloj, kiuj praktike anonime, sed plenanime kaj volontule laboras por libera scio en Esperanto.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 757. 2018-09-20)

17-a Novjara Renkontiĝo.

Ĝi okazos de la 27-a de decembro 2018 ĝis 3-a de januaro 2019, ĵaŭdo ĝis ĵaŭdo, en Wiesbaden, samtempe kaj samloke kun la 10-a NIS, la programo por junuloj. Do ĉi-foje proksime de Frankfurto ĉe Majno.

Aliĝis intertempe jam 72 homoj el ok landoj, 40 el ili el eksterlando, 25 junuloj kaj infanoj. http://www.esperantoland.org/nr/partoprenantoj_nr17.php

Jen la aliĝilo, <http://esperantoland.org/nr/alighilo.shtml#alighilo>.

Lu Wunsch-Rolshoven

EsperantoLand <http://www.esperanto.land>